4e Jaar n° 8. Maandblad. Juli 1945.

# P A C O kaj J U S T E C O.

Orgaan der E°-beweging:
"Paco kaj Justeco" BRUGGE.

Voorzitter : Drs. F.ROOSE - J.& M.Sabbestraat,12,-BRUGGE.
Advertentie: Secretariaat: ROOSE - DE KERSGIETER,
J.& M.Sabbestraat,12,-BRUGGE.
Propaganda : Fons NORRO, Coupure, 33,-BRUGGE.

Postrekening nr 479170 van DE KERSGIETER H.,
J.& M.Sabbestraat,12,-BRUGGE.

() () () () () () () () () () () () () () () () () () () () ()

## Kelkaj konsideroj pri la historio de la Kristanaj religiaj reformadoj.

I.

Tuj depost la ekesto de la Kristana religio, ekestis ankaŭ ĝiaj reformoj. Kaj tio ne haltis en la tuta daŭro de ĝia historio. Por bone kompreni ilin, oni devas vidi ilin en ilia tempo kaj en iliaj tempocirkonstancoj.

La Kristianismo aperis kiam la Grekaj sciencoj estis konkerintaj la tutan civilizitan mondon. Eble la plej bela frukto el tiuj sciencoj estis la filozofio. Sed la filozofio je la tempo kiam Kristo aperis, estis degenerinta ĝis plej granda grado. Ne plu tiuj geniaj sistemoj kaj tiuj geniaj pensoj de Heraklitos, Parmenides, Pytagoras, Sokrates, Plato nek tiu universascienco de Aristoteles. Sed ludo aĉa en belaj sentencoj aŭ harfendado je konceptoj, distingoj, difinoj; ĝenerale: klaĉado pri eltrovaĵoj de pli frua tempo. Tion oni tamen devas konfesi: oni ŝatis filozofii. Oni do filozofiegis kaj filozofiadis. La lasta Evangelio de preskaŭ ĉiuj Sanktaj Mesoj "En la komenco estis la parolo, kaj la parolo estis apud Dio kaj Dio estis la parolo.... Ĉio estas kreita de ĝi kaj sen ĝi nenio estas kreita de tio kio estas kreita. En ĝi estis vivo..." memorigas al la sistemoj de Emspedokles, Anaksagoras kaj aliaj. Kiel la du fortoj amo kaj malamo laŭ la unue nomita kaj la menso laŭ la due nomita estas la ĉion ordigantaj fortoj, nun estas la saĝo (= la parolo, ĉar en la Greka lingvo "Ho logos") kiu estas la kaŭzo de ĉio. Kaj tiel la Greka filozofimaniero-je iu momento (18ª jarcento) la Germana filozofio dekretis ke "en la komenco estis la ago."-estas bone rekonebla en la unua doktrinaro kaj en la unuaj filozofiaj verkoj de la Kristianismo. ONi do ŝategis filozofii senfine pri nuancoj de ecoj, esenco k.t.p. Cetere la parolo "Bizantia harfendado" iĝis proverba. Kaj nuancoj de doktrinoj altiris amasojn en du kontraŭaj partioj. Kiam do oni pensas ke laŭ la ortodoksa kredo estas "tri personoj kaj unu Dio" kaj ke Kristo estis samtempe homo kaj Dio kaj kiam oni legas la profunde primedititajn traktaĵojn de tiu tempo pri tio en kio konsistas fakte "persono" kaj "homo" kaj "Dio" kaj pri la diversaj ecoj de tiuj tri nocioj, tiam oni vere ne miras ke multaj homoj venis al malsimilaj konkludoj. Kaj tamen nur unu konkludo kapablas esti la vera. Ĉar la vero estas nur unu. Kaj certe oni lasus nun tiujn problemojn trankvilaj sed en tiu tempo ili pasiigis la homojn. Do. Sub la regado de papo Zefirino (198-217) iuj Sabellius kaj Kleomenes venis al la konkludo ke "Patro, Filo kaj Sta Spirito" estas fakte tri apermanieroj de unu sama Dia persono. Rimarku la grandan diferencon kun la ortodoksa kredo kaj jen vi havas jam unu herezion.

Sub la regado de papo Dionizio (259-268) (eĉ la nomo memorigas al Grekaj scienculoj!) la episkopo de Aleksandrio, ankaŭ Dionizio, predikas ke la Filo estas kreitaĵo de Dio la Patro. Sekve ne ekzistas esencunueco inter ambaŭ. Gravega herezio! ĉar laŭ la ortodoksa doktrinaro ili ĉiuj tri estas egale aĝaj, saĝaj, potencaj. Ĉirkaŭ la sama tempo, iu Paŭlus de Samosata pretendas ke Dio estas en esenco kaj en persono nur unu. Vidu supre en kio konsistas la herizio. Plie: Kristo estas nur homo (do ne Dio) en kiu venis la Dia saĝo (do ne kun homa naturo kaj Dia naturo).

Sub Miltiades (311-314) ekaperas nova kredo, tute de alia speco. Iu Donatus komencas disvastigi la ideon ke la efiko de la Sanktaj Sakramentoj dependas ne nur de la ofica karaktero (do de la Sakramento

nem) sed ankaŭ de la morala indeco de tiu kiu disdonas, do de la oficisto.

Famega estas la herezio de Arius kiu neis la Dioecon de la "Filo". Multajn amasojn li sukcesis kapti por sia lernado.

En 381 jam novaj herezuloj Macedonius de Konstantinopolo kaj Maratonius de Nikomedio asertas ke la Sta Spirito estas kreitaĵo de la "Filo" (ni jam vidis similan herezion) dum ke Apollinaris de Laocidea siaflanke klopodas por konvinki ke Kristo ne posedis racian animon. Li tiamaniere difektis la Sanktan homoecon de Kristo. Laŭ la Kristana kredo Kristo estis sankta ankaŭ kiel homo kaj kiun aŭ spite de siaj homaj ecoj.

En 411 sub la regado de papo Innocentius Ia (401-417), Pelagius kaj Celestius neas la heredan pekon kaj la necesecon de la graco por iĝi sanktfeliĉa. Laŭ ili oni kapablas vivi laŭ la ordonoj de Dio ankaŭ sen tiu graco. La herezio de Pelagius disvastiĝis ankaŭ tre tre multe.

Sub papo Celestinus (422-432) nova ondego de herezio: la Nestorianismo. Nestorio kaj la skolo de Aleksandrio lernas ke en Kristo la du personoj (la homa kaj la Dia) ne venis al esenca unueco sed nur al morala unueco. Do estis la disigo de la du naturoj en Kristo. Kaj tiamaniere oni ja povis diri ke Maria estis la patrino de Kristo sed ŝi ne estis la patrino de Dio!

Sub papo Leo Ia (440-461) iu Eŭtiĥes lernis ke la homa naturo de Kristo tute envolviĝis en la Dia naturo tiel ke oni rajtas paroli nur pri unu naturo. Pli malfrue oni nomos tion la "Monofizitismo" (Monos= sola kaj fuzis=naturo) kaj ĝi estis metata en la vico de la herezioj.

Patriarĥo Sergius de Konstantinopolo (610-638) distingis kaj nuancigis ankoraŭ pli. Kristo estis certe Dio kaj homo kaj certe havis du naturojn sed Li ĉion faris per unu Diohoma energio. (la Monenergetismo).

Tia tre subtila rezonado tamen ne sukcesis erarigi la klerajn ekleziulojn kaj ankaŭ tin oni envicigis la bandon de la hereziuloj. La pli malfrue eltrovita anstataŭo de energio per volo (do: nur unu Diohoma volo) ne havis pli da sukceso.

Kaj jen ni venis al la fino de la antaŭmezaĝaj reformoj. Ni rimarku nur ke la sola necesa reformo ne okazis. La edikto de Milano en 313 metis la Kristanismon en eksterordinara bonega situacio. Imperiestro Konstanteno faris tion ĉar li vidis la grandan forton kiun la Kristanismo kapablis doni al li.

Efektive, depost tiu jaro la altranga eklezulaŕo estas la fidela servantaro de la imperiestro. Imperiestra politiko kaj eklezio tre intime interligiĝis. Kiu kontraŭstaris lian politikon tiu trovos ankaŭ la eklezion kiel sian malamikon. Kaj eĉ se la imperiestro ne agas tute Kristane, la avantaĝoj kiujn li donas al la eklezio sufiĉe kompensas. La anatemoj de la episkopoj faradla reston. Unu ekzemplo. Antaŭ tiu tempo tre multaj Kristanoj rifuzas militservi pro la Krista ordono. Depost nun militrifuzado estas severe malpermesata. Jen reforminda afero. Ĉar ja vere estas interesa tio kion kredas la homoj sed pli gravas kiel la homoj kondutas.

II.

La reformoj de la mezepoko havas tute alian karakteron. Oni ne plu ŝatas tiom filozofii kiom oni ŝatis tion antaŭe. La mezaĝo estas la epoko de la forta kredo kaj de la religia vivado. Certe en tiu tempo, oni tion fiagis kiom en la nuna tempo. Sed ne pro principo. Jes pro la arda temperamento kaj la miskompreno. Tial la pentofaro estis multe pli granda ol en la nuna tempo. Nun oni ne plu punas per pilgrimadoj al la Sankta Tero nek al S-ta Jakobo en Kompostella en Hispanujo malgraŭ la facileco de la vojaĝoj nuntempaj. La longa fastotempo ne plu estas sekvata. Tre multaj sanktulaj festotagoj estas nun "Suspenditaj Sanktulaj Tagoj". Alia scienco ol la filozofio atingas nun sian plejalton: la mistiko: la Kristana Nirvanah. La Nederlandanoj kaj la Germanoj okupas tiel eminentan lokon en tiu scienco. Memoru Hadewijĥ kaj Ruusbruk. Nur iagrade oni povas kompari ĝin al la Hinda Nirvanah ĉar Ruusbruk diras ke la mistikulo devas esti per ambaŭ piedoj sur la tero kaj esti preta forlasi sian endian vivon por helpi ĉeproksimulojn. Sed vere en tio konsistas la mistiko: pripensego pri la ĉeesto de kaj la vivo en Dio; pripensego pri la virtoj de Dio precipe la ĉion amplekasanta amo. Centrigo de la pensado en tio. Kaj priskribi la animon en tia stato. Nu la herezioj reformadoj estas plej multe aŭ sekvoj de la unua priskribita karaktero de la mezepoko, [illegible] la .../.

reli de vivolo, kiel ekzemple la herezio de la sinvipegantoj, kiuj ofte en ekstazo mutiliĝis kaj kripliĝis sian propran korpon ĝis freneziĝo. Ankaŭ la mistiko ofte kondukis la homan cerbon al herezio. Ekzemple la grupo de la Bruselanino Blumardine kiu kaŝis sin malantaŭ citaĵo de la Sankta Aŭgusteno "Amu, kaj faru kion vi volas" por efektive ĉion fari kion ili deziris. Dum ke la elparolo de la nomita Sanktulo signifas: se vi havas la veran amon, tiam vi certe ne fiagos; faru ĉion kion vi volas se vi estas inspirata de la vera amo. Estas alifflanke konata fakto ke la mistiko kondukis multajn al panteismo. La tutgranda leĝo kaj la universon reganta forto estas la amo. Dio estas la grand-amo. Ĉiu kreitaĵo estas manifestiĝo de tiu amo. Ankaŭ ni. Ni estas manifestiĝoj de Dio. Tiel oni venas al panteismo: Ĉio estas Dio. La plej fama ekzemplo estas la Germano Ekhart. Estas ankaŭ signifoplena ke Hitler dediĉis la unuan parton de sia libro "Mein Kampf" al tiu Ekhart. Kaj denove oni vidas ke ĉiuj tiuj reformantoj eraris. Ne tio kion ili reformis devis esti reformata. Se io estis reformenda, estis tio-ĉi. Ĉirkaŭ la mezo de la oka jarcento estis kreata la "papa Ŝtato". Mi ne kontraŭparolas la valoron de la argumento ke tiamaniere la papo estis pli sendependa de la aliaj Ŝtatoj kaj Ŝtatestroj. Restas tamen la fakto ke multaj nobelaj homoj klopodis por iĝi papo, kvankam ili ne sentas la Dian vokon, nur por venigi la kronon de tiu Ŝtato en sia familio. Tio okazis precipe je la fino de la Mezaĝo kaj en la Renesancotempo. Tiam efektive la altranga eklezianaro tute kaj komplete forgesis la admonon de Jesuo: Mia regno ne estas de tiu-ĉi mondo.

III.

Mi venis al la Ĉeĥo Johan Hus. En la historio li estas ofte nomata: la antaŭulo de Martin Luter. Tute malprave, laŭ mia opinio. Efektive ne estas tiom pro lia herezio ke li estis kondamnata sed jes pro lia ribelemo al la papo. Kaj tio lasta havas ... politikajn kaŭzojn. Ĉeĥujo (de Bohemio kaj Moravio) estis parto de la Sankta Roma Germana Imperio fondita de Otto la Granda en 962 kaj kiu ekzistis ĝis en 1806. En tiu tre longa historio la diversaj partoj havis foje preskaŭ kompletan sendependecon, foje ili estis tute dependaj. La ne germanaj partoj devis toleri germanigon t.e. germanajn juron, lingvon, oficistojn k.t.p. Male al la aliaj slavaj popoloj la Ĉeĥoj estas eksterordinare perseverensaj, batalemaj, energiaj. Energie ili luktis kontraŭ germanigo. Precipe akra estis la lukto kiam la Germanoj fondis la unuan germanan universitaton en Praha. En tiu lukto la altranga Roma eklezianaro subtenis la Germanan imperiestron. Do la Ĉeĥoj por sia konservo kiel nacio devis samtempe lukti kontraŭ la Roma eklezio. Unu de la plej grandaj Ĉeĥoj estas precize Johano Hus (1369-1415). Li havis tre multe da influo, li estis tre klera, li skribis kaj paroladis bonege. Li estis la konfespatro de la Bohemia reĝino. Li konsideris la Germanojn kiel fremdulojn kiuj ne rajte en-miksiĝas en ĉeĥaj aferoj. "Kiam Dio disdonis la teron, Li donis al ĉiu popolo unu parton por posedi ĝin kaj por ne miksiĝi kun aliaj". Tio estis la lukto de Johano Hus. Kiam la reĝo de Bohemio, kiu estis tamen subulo de la imperiestro, pravigis Johanon Hus, tre multaj germanaj profesoroj kaj studentoj forlasis la Prahan Universitaton kaj iris al Leipzig kie ili fondis la unuan vere germanan universitaton en 1409. Estas tiel ke ankaŭ la Ĉeĥaj Katolikoj konsideras Hus kiel la nacian heroon. Tamen por tio la lukto ne finiĝis. Ĝi ĉiam daŭris tiel longtempe kiel Germanoj kaj Ĉeĥoj vivis kune. De tio la akrega interbatalado de Sudetgermanoj kaj Ĉeĥoj. De tio ankaŭ ke la lukto de Ĉeĥoj kontraŭ la Roma eklezio iĝis tradicia. Por la konservo de la Ĉeĥa nacieco Joh.Hus devis kontraŭbatali la Papon. Tiel venis en Ĉeĥujo tradicia "for-de-Romo-movado". En Julio 1933 unu de miaj ĉeĥaj korespondantoj skribis al mi:"Mi estas senreligia, ĉar pro mia ĉeĥ. nacionalismo mi ne povas esti en Katolika eklezio. Sed mi ne estas ateisto. Mi kredas libere je Dio, Kristo kaj ĉiuj Granduloj. Sed mi estas kontraŭ la Papo. Kial ? Ĉar mia ĉeĥa nacio estis dum 300 jaroj kruele subregita de germanoj kaj Katolikoj." Tio estas tute natura por Ĉeĥo kaj tiuj linioj montras tre bone la ĉeĥan spiriton.

Ni rimarku tie-ĉi ke ekzistis la ableco de la sama okazos ĉe ni. Feliĉe la aferoj alie turniĝis. Kiam dum la Mezaĝo Flandrujo estis pruntoloko de la Francaj reĝoj kaj ke tiuj lastaj, en la dekkvina kaj dekkvara jarcentoj denove fortaj, montris kaj efektivigis la tendencon ĉiujn grundlokojn ree centraligi, la reĝo havis kiel fidelan servanton de sia politiko la episkopon de Doorni. ....,...

sub kies religia Aŭtoritateco kuŝis preskaŭ la tuta Flandrujo. Kiam la Flandroj por sia ekzisto luktis kontraŭ la Franca reĝo ofte ankaŭ la Doornika episkopo punis ilin. Je iu momento en 1302 la Papo favoris al la Franca reĝo. Poste li malpravigis lin. En la plena Mezaĝo kiam ĉio tio okazis tie-ĉi, grandskala ribelado kontraŭ la Papo ne ankoraŭ estis ebla. La spirito de pia respekto kaj obeemo al plej alta kaj plej inda persono estis ankoraŭ tro forta. Kaj pli malfrue kiam tiu spirito aliiĝis la Papo ne daŭre estis la kumulo de la Franca reĝo. Kaj fine en 1526 Flandrujo ne plu estis pruntodono de la Franca reĝo.

IV.

En la deksesa jarcento la spirito de la Renesanco ĉie disvastiĝis. La severa mezepoka koncepto de la vivo estas forĝetata. Anstataŭ forteni siajn okulojn de la mondo por direkti ilin sole al Dio kaj al postmorta vivo, oni nun volas ĝui la naturon kaj la homa individuo ekhavas ankaŭ valoron. Ĝi ja estas la plej bela kreitaĵo de Dio. Oni malkovras la antikvan Grekan arton kiu elradias tiun saman estimon de la naturo kaj de la individuo. La granda komerco depost la dua duono de la mezepoko estigis grandajn riĉecojn kaj tui fakto igis la homojn emaj al lukse vivado. Tiu spirito kaptas eĉ tiujn kiuj devis doni plej belan ekzemplon al la mondo: la Papo kaj la Papa korto. Ili okupas sin pri arto, aŭ pri scienco aŭ pri politika kaj luksa vivado. Ne pri religio. La malaltranga eklezianaro estis ne instruita kaj sekvis la popolo, en religiaj aferoj malsaĝa. Jam kelkaj kleraj homoj antaŭvidas la malbonegon kiu rezultos el tio. Sed la koncilio de Konstanz 1414 nur iomete priparolas la aferon. Kiam fine venos la unua granda reforma movado, ĝia iniciatanto Girolamo Savonarola, eble la plej potenca paroladisto de ĉiuj tempoj, Dominikano, mortas sur la brulŝtiparo. La reformado devos veni ekster kaj kontraŭ la eklezio. Martin Luter foje iris al Romo kaj revenis tute perplekse el tiu "Marĉo de Maljustaĵoj". Papo Leo la deka el la familio de Medici, la leono, "kiu eniris Papecon kiel vulpo, kiu vivis kiel leono kaj kiu mortis kiel hundo", kiu ĉiam bezonis monon, tiu papo volis restarigi la S-ta Petropreĝejon pli luksa ol ĉiuj aliaj preĝejoj. Li dekretis indulgencon por tiuj kiuj volas doni monon. Martin Luter esperis ke la Papo elektos lin por prediki. Sed la papo elektis Dominikanon Tetzel. Tiu lasta, por ke la homoj rapide kaj multe donu, predikis novaĵojn. La malhumila, ofendita Luter kontraŭpredikis. Li atakas la Papon kiu volas silentigi lin. La plej granda parto de la aŭgustanoj, el la ordeno de Luter, sekvas sian majstre paroladantan kaj skribantan gvidanton. Ili mortas sur brul-ŝtiparoj, kantante "Te Deum Laudamus". Ili kredas ke Luter restarigas la veran eklezion de Dio kontraŭ tiu de la diablo-Papo. Sed Karlo la kvina, la imperiestro, ne volas religian diversecon ĉar tio endanĝerigos la unuecon de lia regno. Li ekzilas Luter el la Germana imperio. Ne gravas. Multaj teritoriaj reĝoj vidas en tio la ilon por faligi la potencon de la imperiestro kaj ili subtenas la novan instruadon. Ili eĉ kaŝas Luter kiu el sekreto kapablas daŭre labori. Aliaj reformatoj leviĝas. En Svisujo Ulriĉ Zŭingli. En Francujo Yohano Kalvin. En Svedujo Gustav Vasa liberigas sian landon el Dana superregno kaj samtempe enigas la novan doktrinaron. Poste la Danaj reĝoj mem oficialigos la reformadon en sia lando kaj en sia posedaĵoj: Islando kaj Norvegujo. En Anglujo Henriko la oka kiu unue protektis la Roman eklezion, pro kiu fakto li akiris la honoran titolon "defensor fidei" (protektanto de la kredo), ŝiras la eklezion en Anglujo for de Romo ĉar la Papo ne volas konsenti en rompiĝo de lia geedziĝo. En ĉiuj landoj, religiaj militoj. Tre bedaŭ la politiko miksiĝas kun la religio. Ĝi kaŭzas la disiĝon de la Nederlandoj kaj la ruiniĝon de Germanujo. Kaj fine kiam post jarcento la religiaj bataloj iom rekvietiĝis, kia rezulto ? Tie staris multaj protestantaj eklezioj. La luteranismo predikis ke la forta fido sen la bonaj agoj sufiĉas por eniri la Dian regnon post la tera vivo. Kaj ke ĉiu homo povas legi kaj komprenI la Biblion se li nur lasas sin inspiri de la Sankta Spirito dum la legado. Kaj ke multaj sanktaj sakramentoj ne estas de Dio fonditaj.k.t.p. k.t.p. Kaj la Kalvinismo predikis ke de antaŭ ĉiuj tempoj estas jam fiksita via postviva sorto ĉu iri ĉu ne iri en la Dia regno kaj ke vi tute ne kapablas ŝanĝi ion al tiu decido. Ĉu por tiu celo oni luktis ? Ĉu estas tio kio estis reformanda ? Ĉu vere oni bezonis ŝanĝi la doktrinaron ? Aŭ la konduton ? Tiel ni vidas ke ankaŭ tiu-ĉi reformado estas komprenende el la tempocirkonstancoj kaj ke oni eraris. Tiel la tuta historio estas la sumo de la homaj eraroj.

.....,...

La vera reformado faris la tiel nomata Katolika kontraŭreformado dum la koncilio de Trente kiu daŭris 18 jarojn. Ĉiujn doktrinaĵn punktojn ili ree kaj funde pristudis. Grandskale ili reformis la vivkondutojn de Papo, kardinaloj, monaĥejoj k.t.p. Por iom da tempo venis denove iom pli da Kristaneco en la Krista eklezio. Sed tro malfrue! La multaĵn perditaĵn landojn kaj popolojn ili ne regajnis! Preterene restas la rememoro al la sola bona Papo el tiu fia epoko, Adriano la sesa el Utreĥt, kiun post unu jaro la kardinaloj verŝajne mortigis. La historio, la sumo de la homaj eraroj.

Drs Fernand Roose.

-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-

Atentu! Atentu! So.So.So.(por tiuj kiuj ne ankoraŭ scias - SoSoSo estas la "Senkompata Sekreta Servo") do:
SoSoSo aŭskultas ĉie!

Atentu! Atentu! SoSoSo aŭdas ĉion !!!
Atentu! Atentu! SoSoSo laboras ĉiam !!!
Atentu! Atentu! SoSoSo esploras ĉiel !!!
Atentu! Atentu! SoSoSo vidas ĉiun !!!

="="="="="="="="="="="="="="="=

Vlaamsche Esperantisten, uw blad is

F L A N D R A   E S P E R A N T I S T O

uitgebreid, actueel, interessant, veelzijdig, goed ingelicht.

Uitgegeven door Flandra Esperanto-Instituto V.z.W.
Instelling voor Esperanto-Onderwijs & Propaganda.

Redactie & Administratie: F.Van Humbeekstr.3,BRUSSEL-WEST.

Losse nummers:5 Fr. Abonnement tot einde 1945 (8 Nrs) 36 FR.
Postrekening 3268.51 van F.E.I., Brussel.

="="="="="="="="="="="="="="="=

%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%

Atentu! Atentu! So.So.So. (por tiuj kiuj ne ankoraŭ scias - SoSoSo estas la "Senkompata Sekreta Servo") do:
SoSoSo aŭskultas ĉie!

Atentu! Atentu! SoSoSo aŭdas ĉion !!!
Atentu! Atentu! SoSoSo laboras ĉiam !!!
Atentu! Atentu! SoSoSo esploras ĉiel !!!
Atentu! Atentu! SoSoSo vidas ĉiun !!!

%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%

## Pri kaktusoj kaj matematik-instruistoj.

En la lastaj cent jaroj, la kaktuso faris sian triumfveturon tra Okcident-Eŭropo. La malbona kreskaĵo de la meksikaj dezertoj trovis bonan regalon en niaj salonoj kaj loĝĉambroj. Homoj kiuj ne scias kiamaniere foruzi sian tempon, skribis pezajn librojn pri kaktusoj, "pur-sang"-aj kaj degeneritaj. La epidemio dismetiĝis, kaj kreskis ĝis kolekt-volego en verandoj kaj dom-ĉambroj. La riĉuloj klopodis distingiĝi per maloftaj specoj, la malriĉuloj per la nombro malegalaj ekzempleroj; la virinoj per la kulturo de dolĉaj, molaj specoj, kaj per la degenero de kaktusoj, ĝis kreskaĵaĉoj sen pikiloj; kaj la viroj, por eterna kontraŭdiro, per la posedaĵo, de duraj, pikegantaj specoj. Kaj fine, la tut-speciala grupo de matematikinstruistoj, kolektis, kaj pristudis tutkore, la idealajn kaktusojn, t.e. tiujn, kun plene geometria formo.

Estas fakto ke la kaktuso estas la plej matematika kreskaĵo, ĝis nun konata. Ĉiu pikilaro de definita speco, havas ĝian bone definitan nombron de pikiloj. La plej granda parto de la specoj, estas de 3-6-12-18...angula formo. Sur la folioj de aliaj formas la pikilaroj perfektajn egalajn "parallelepipeda". Ilia kresko kaj formo estas definata per la leĝoj de la ekvilibro. Kelkaj nur ĉiu 2-6-8-10... jaroj ekfloras. La arkoj en iliaj formoj estas la plej perfektaj paraboloj aŭ hiperboloj... kaj la matematik-instruisto ĝuas...

Sed la Kaktusoj venĝas sin! Ili estas lacaj de la formuloj matematikaj, de la mezur-linialoj, .../...

de la cirkeloj... Ili tiel influas tiun la matematik-instruiston, ke li pli kaj pli egaliĝas al kaktuso. Lia barbo kreskeĝas kaj malmoliĝas: kaj, plej feliĉe, la pensaĵo de la matematik-instruisto iĝas tiel pika, seka, geometria, ke ili certe ne plu estas homoj. Por ili, nur la matematika objektiveco, kaj la matematikaj kaktusoj ekzistas. Kaj tiu-ĉi nur estas la komenco, eĉ en la korpa formo de la instruisto, li jam ekmontras kaktusan formon. La mentono iĝas kwadrata, la okuloj pikantaj, la nazo triangula, la corbujo ronda k.t.p... Lia hararo mem ariĝas en pintoj, egale al la pikilaretoj de la kaktusoj... kaj ili perdas ĉiun subjektivan animon...

Tiel estas la tragedia venĝo de la kaktusoj sur la matematik-instruisto...

Eksstudento.

## GRUPA VIVADO.

La kurso pri kiu ni diris en la lasta rubriko ke ĝi estis malsukceso, turniĝis en sukceso. Efektive la genovuloj intertempe venis ĝis la nombro 26. Pro la nun okazantaj ekzamenoj, multaj studentoj ne ĉeestas la nunajn lecionojn. Ĉio tamen estos ripetata kaj ni esperu ke la libertempovojaĝoj ne estos alia tro grava malhelpilo al la kurso.

Kun grandega ĝojo ni povis fine travivi la revenon de niaj du fervoregaj propagandistoj Grégoire Maertens kaj Et.De Baets kiuj jam komplete relaboras en nia medio. Ankaŭ samideanoj Achilles De Rudder kaj Constant Cosyn revenis kaj ni esperas ke ili baldaŭ reiĝos la fidelaj membroj kiuj ili estis. Bedaŭrinde du multpromesantaj kursistoj devis forlasi nin por militservi: Sto Cool kaj Gilbert Leuridan. Tiu lasta plej bone trapasis la ekzamenon. Ankaŭ la aktiva membro Fernand Vernimmen libervole forlasis nin por same militservi. Tamen en lia nova medio li bone propagandas.

Ni estas ĉiam tre kontentaj kiam ni de tempo al tempo povas revidi samideanon Boudewyn Verleye kiu loĝas nun en Gent. Nia grupo vivado depost nun iĝos pli interesa pro la kontakto kun la eksterlando kaj la vizito de eksterlandanoj. Samideano Pickard el Londono faris paroladon pri la Mahomedana religio. Al multaj demandoj li devis poste respondi. Unu semajno poste la Skota samideano kaj jam honora membro de nia grupo, Latimer, paroladis pri Sovjetrusujo. Delikata kaj danĝera temo. Kaj multaj malsame opinias. Ni tamen decidis fari tion ĉar ni opinias ke devas esti eble, en plena kaj serena objektiveco, priparoli tiajn temojn. La Esperantomondo devas esti la tereno sur kiu ĉiuj interpaciĝas kaj klopodas por interkompreni. Bedaŭrinde, ekster nia malgranda grupo oni ne agas tiel. En la cetera mondo oni ne klopodas por interkompreni sed jes por mortbati unu la alian. Eĉ la Esperantomondo ne multe ŝanĝas al tiu situacio. Kaj tamen nur en tio ekzistas ĝia rolo, ĝia signifo, ĝia bono. Estas tial ke oni devus konstrui apartan ideologion kaj fari apartan edukon kiel ni jam provis fari en nia grupo, en niaj paroladoj, konferencoj, en nia revuo. Ĉe ni oni povas lerni kiel sensence estas interbatali se oni lernas ĉion vidi elsupre, ĉar ĉiu konflikto rezultiĝas el la fiegoj de kelkaj kaj el la miskompreno de la grandaj amasoj.

## Angulo de la Poesio.

Pri la lasta poemo de X.Y.Z. ni ricevis artikolon. Jen ĝi estas:

### Mislukte Kritiek.

Ik verdiepte mij op blz.5 van het 7de N° in de openbaring:X.Y.Z. Ik heb er geen titel voor gevonden. Niemand kan er een vinden, want elk opschrift lijkt banaal en dwaas, wanneer men leest wat er op volgt.

Er staat ook geen nota bij van de redaktie. En dat is goed, want ook dat ware eentonig en vervelend. Maar ik dacht: misschien ligt dit pareltje voor velen in het duistere van het onopgemerkte!

En toch, het is zóó vol simpelheid, dat het overvloed is; het is zóó vol rythme dat het alleen gevoel schijnt. Het lijkt de kadans te zijn -oh tegenstelling!- van de rustig droomende natuur!

Ik zeg niets over rijm en versvoet; ik ben geen technieker; ik heb hun aanwezigheid gevoeld, dat voldoet!

Maar die woorden, ah neen, het zijn geen woorden meer, het zijn klanken die harmonieeren met mijn zielezangen en samen een opbruisende melodie vormen, die weer verzinkt in verlangen. .../...

Ik voel: alles is zóó echt, zóó diep, zóó eeuwig onvoldaan, zóó troosteloos in totale overgave... ik speur geen "Wil"!

De mensch spreekt, zingt met de natuur: Hij en de natuur. Hij is wars van alles. Hij heeft echter nog een doel, maar weet dat het mislukt, en hij mocht vergeten, maar hij kan geen ontrukking vinden: immer blijft een drang naar verre verte.

'k Wil varen... den hemel eindloos in, naar het onbekende. Het is niet: 'k wil wiegewagen, ik voel dat het moet zijn, 'k zou willen wiegewagen. Maar juist dat kontrast verheft het geheel in het onwezenlijke, in het verre verlangen:

Iets liefs dat men verloor, en niet meer vond,
Als alles wat heel ver is en heel schoon. (W.Kloos)

De dichter (wie durft hem anders noemen), ligt daar met open, gekloven hart, en ik begrijp, ontsteld, de zwaarte van oneinligheid.

Het trekt mij, in lokkenden sirenenzang; 'k wil buiten zijn, in 't bosch en rieken doffe geuren en prikkelend dennensap, 'k wil witte wolkjes volgen, "Fantasia" en 'k wil vergeten!

X.Y.Z. heeft met sidderende hand, in mij de juiste trillende snaar geraakt, en ik lees... en vergeet.

(Ach, wat zijn woorden onvolmaakt, om te duiden wat ik voel!)

Vreemde bloesem.

Ni estas scivolemaj por ekscii kion X.Y.Z. pensos pri tiu-ĉi kritiko. Kaj nun alia poemo de la sama poeto:

- - - - - - - -

Waarheen de wolken drijven,
is raadsel en geheim;
waarheen de winden ijlen,
is stille mijmerij...

Waarheen mijn leven vliet
is wazig-horizont,
die wonder-ijl verdwijnt
zacht in mijn ziele-gond.

X.Y.Z.

(')(')(')(')(')(')(')

Rimarko: Pro manko de loko, angulo de la serĉemuloj forfalas.

ĉĉĉĉĉĉĉĉĉĉĉĉĉĉĉĉĉĉĉĉĉĉĉĉ

Oorlog.

't Is oorlog in het land
en strijd in menschenharten
en breken van den band
en smeden van veel smarten
en alles steeds om niets.

Herinnering vernijdt geen daad
zij 't nog zoo slecht. Smaad
kleeft herinnering aan de daad,
en drijft tot nieuwe smaad.
En alles steeds om niets.

En woorden werk bevecht 't geweld
en samenkomst en dure eed.
Toch ligt steeds woord geveld
daar HAAT den oorlog smeedt.
En alles steeds om niets.

Dit alles steeds om niets.
Tot menschdom liefde mint
en grootschheid van de daad bezint.
DAN komt de oorlog niet.

Fons Norro.

!=!=!=!=!=!=!=!=!=!=!=!=!=!=!=!=!=!=!=!=!=!=!=!=!=!=!=!=!=!=!=!=!

Pensuloj pensas:

-Kiel glavo vundas la korpon tiel maldeca vorto vundas la animon.

-Vi neniam misfaros se la racio estas la gvidanto.

¢¢¢¢¢¢¢¢¢¢¢¢¢¢¢¢¢¢¢¢¢¢¢¢¢